

27 MALAPERO DE SINJORO HIRŠ

„Ĉi tio," diris sinjoro Tausig, „ne estis malbona historieto, sed ĝi havas ege grandan mankon, ke ĝi ne okazis en Prago. Sciu, ankaŭ en kriminalaj aferoj oni devas konsideri la patrion. Mi petas vin, kiel rilatas nin iu historieto en Palermo aŭ sciu diablo kie? El tio ni havas nenion. Sed kiam ekzemple sukcesas ia tia pli bona krimo en Prago, kredis min, sinjoroj, tio ĝuste iel flatas min; mi diras al mi, nun oni parolas pri ni en la tuta mondo; sciu, tio iel onin varmigas. Kaj poste, tion la prudento diras, kie sukcesas konsiderinda krimala afero, povas ankaŭ negocoj prosperi; tio atestas pli altnivelan situacion, ĉu, kaj entute ĝi vekas konfidon. Sed la farinto devas esti kaptita.

Mi ne scias, ĉu vi memoras la kazon en Longa strato, kun la maljuna Hirš; li havis tie ledokomercejon; sed iam-tiam li vendadis persajn tapiŝojn kaj similajn orientaĵojn; sciu, li havis dum multaj jaroj ian komercejon en Istanbulo - de tie li havis postsekve ion sur la hepatoj; tial li estis malgrasega kiel mortaĉa kato kaj bruna, kvazaŭ oni eltirus lin el tanujo. Kaj la tapiŝistoj el Armenio aŭ el Smirno venadis al li, ĉar li sciis ŝteliste interkompreniĝi kun ili. Ili estas grandaj friponegoj, tiuj armenoj; ilin devas eĉ judo atenti.

Tiu Hirš havis do en teretaĝo ledojn kaj de tie oni iris per spirala ŝtuparo en lian kontoron; post la kontoro estis lia loĝejo kaj tie sidis sinjorino Hirš; nome ŝi estis tiel dika, ke tute ŝi ne povis iradi.

Foje ĉirkaŭ tagmezo iris iu komizo supren en la kontoron al sinjoro Hirš, ĉu sendi kredite ledon al iu Veil en Brno; sed sinjoro Hirš ne estis en la kontoro. Tio estis stranga, sed la komizo diris al si, li, sinjoro Hirš iris eble por momento apuden al sinjorino Hirš. Sed post tempeto venis de supre servistino, ke sinjoro Hirš venu al tagmanĝo. Kio, al la tagmanĝo, diris la komizo, sinjoro Hirš estas ja en la loĝejo. Kiel li povas esti en la loĝejo, diras la servistino, sinjorino Hirš sidas ja la tutan tagon apud la kontoro kaj ne vidis lin de mateno.

27 ZMIZENÍ PANA HIRSCH

„Tohle," ŝekl pan Taussig, „nebyl špatný případ, ale má moc velkou chybu, že se nestal v Praze. Víte, i v kriminálních věcech má mít člověk ohled na domov. Prosím vás, co nám je po nějakém případě v Palermě nebo kterých čertech? Z toho my nic nemáme. Ale když se takhle podaří nějaký takový lepší zločin v Praze, tak to mně, páni, zrovna jaksi lichotí; říkám si, teď se o nás mluví v celém světě; víte, ono to tak nějak hřeje. A pak, to dá rozum, v takovém místě, kde se vyvede slušná kriminální věc, mohou jít i obchody; ono to svědčí o větších poměrech, že jo, a budí to vůbec důvěru. Ale to se musí ten pachatel chytit.

Já nevím, jestli se pamatujete na ten případ v Dlouhé třídě se starým Hirschem; on tam měl obchod s kůžemi, ale sem tam taky prodával perské koberce a takové ty orientální věci; víte, on měl po mnoho let nějaký kšeft v Cařihradě – však si odtamtud přinesl něco na játrech; proto byl vychrtlý jako chciplá kočka a hnědý, jako by ho vytáhl z třísla. A tihle tepicháři z Arménie nebo ze Smyrny za ním chodili, protože se s nimi dovedl tak po zlodějsku domluvit. Oni to jsou velcí gauneři, tihle Arméni; na ty si musí dát pozor i žid.

Teda ten Hirsch měl v přízemí ty kůže a odtamtud se šlo po takových točitých schůdkách do jeho kontoru; za kontorem byl jeho byt a tam seděla paní Hirschová; ona totiž byla tak tlustá, že nemohla vůbec chodit.

Tak jednou k polednímu šel jeden příručí nahoru do kontoru za panem Hirschem, jestli mají poslat kůži na úvěr nějakému Weilovi do Brna; ale pan Hirsch v kontoru nebyl. Ono to sic bylo divné, že jo, ale ten příručí si ŝekl, on pan Hirsch šel třeba na skok vedle k paní Hirschové. Ale za chvíli vám přišla shora služka, že pan Hirsch má jít k obědu. Jak to, k obědu, ŝekl ten příručí, vždyť pan Hirsch přece je v bytě. Ale kdepak by byl v bytě, povídá služka, přece paní Hirschová sedí celý den hned vedle kontoru a neviděla ho od rána.

Kaj ni, diris la komizo, ankaŭ ni ne vidis lin, ĉu, sinjoro Venceslao? - sciu, li estis servisto. Je la deka mi alportis al li poŝtajon, diris la komizo; kaj sinjoro Hirš eĉ insultis min, ke ni estus devintaj urĝi tiun Lemberger pro la bovidaj tanitaj ledoj; ekde tiu tempo eĉ ne nazon li elŝovis el la kontoro. Jesuomaria, diris la servistino, en la kontoro ja li ne estas; ĉu eble li iris ien en la urbon?

Tra ĉi tiu butikon li ne iris, diris la komizo, ni certe lin vidus, ĉu, Venceslao; eble li iris tra la loĝejo. - Ne eble, diras la servistino, ĉar sinjorino Hirš vidus lin! - Atendu, do, diris la komizo; kiam mi vidis lin, li surhavis negliĝan surtuton kaj sur la piedoj pantoflojn; iru rigardi, ĉu li prenis ŝuojn, galoŝojn kaj vintran surtuton - sciu, tio okazis en novembro kaj multe pluvis. Se li vestis sin, diris la komizo, li iris ien en la urbon; se ne, li devas do esti ie hejme, ĉu.

La servistino flugis do supren kaj post momento revenis tute perpleksa. Diomia, sinjoro Hugo, ŝi diris al la komizo, ja li, sinjoro Hirš, ne prenis ŝuojn nek ion pluan; kaj sinjorino Hirš diras, ke tra la loĝejo li ne povis iri, ĉar li devus ja iri tra ŝia ĉambro! - Tra la butikon ankaŭ li ne iris, diris la komizo; en la butikon hodiaŭ absolute li ne estis, li nur venigis min en la kontoron pro la poŝtaĵo. Venceslao, iru lin serĉi!

Unue ili kuris en la kontoron; tie estis nenia malordo; nur kelkaj rulitaj tapiŝoj en angulo, kaj sur la tablo ankoraŭ estis ne finskribita letero al tiu Lemberger; kaj super la tablo brulis la gaslumo. Estas do jam tute certe, diris tiu Hugo, ke sinjoro Hirš nenien iris; se li irus ien, li estingus la lampon, ĉu. Nepre li estas ie en la loĝejo. - Ili traserĉis do la tutan loĝejon, sed nenie io. Sinjorino Hirš komencis en sia fotelo korŝire plori; ĝi aspektis, diris poste tiu Hugo, kvazaŭ tremus tie ia amaso da gelato. Sinjorino Hirš, diris tiu Hugo - estas stranga, kiel tia juna judo subite fariĝas prudenta, se necesas esti - sinjorino Hirš, ne ploru; li, sinjoro Hirš, nenien fuĝis, la ledoj ja nun prosperas kaj krome li enkasigis neniajn bonhavojn, nu jes; li, sinjoro ĉefo, devas ie esti.

A my, ŝekl ten příručí, jsme ho taky neviděli, že, pane Václav?.- víte, to byl sluha. V deset hodin jsem mu donesl poštu, povídal ten příručí, a pan Hirsch měl ještě na mě hubu, že jsme měli urgovat toho Lembergra skrz ty telecí usně; od té doby nevystrčil z kontoru nos. Ježíšmarjá, řekla ta služka, vždyť on v kontoru není; nešel on snad někam do města?

Tady skrz krám nešel, ŝekl ten příručí, to bychom ho museli vidět, že jo, Václave; to on snad ŝel skrz byt. To není možné, povídá služka, to by ho paní Hirschová viděla! Tak počkejte, ŝekl ten příručí; když jsem ho viděl, tak měl župan a na nohou trepky; jděte se podívat, jestli si vzal boty, kaloše a zimmník, víte ono to bylo v listopadu a moc přšlo. Jestli se oblékl, povídá ten příručí, tak ŝel někam do města; jestli ne, tak musí být někde doma, že jo.

Teda ta služka lítla nahoru a za chvíli se vrátí celá bez sebe. Proboha, pane Hugo, povídá tomu příručímu, vždyť on pan Hirsch si nevzal boty a nic; a paní Hirschová říká, že skrz byt nemohl jít, vždyť to by musel jít skrz její pokoj! Skrz krám taky nešel, ŝekl ten příručí; on vůbec dnes v krámě nebyl, jen si mě zavolal do kontoru skrz tu poštu. Václave, pojd'te ho hledat!

Tak nejdřív běželi do kontoru; tam nebyl žádný nepořádek, jen pár těch srolovaných kobereců v koutě, a na stole byl ještě nedopsaný dopis na toho Lembergra; a nad stolem hořelo plynové světlo. Tak to už je jisté, ŝekl ten Hugo, že pan Hirsch nikam nešel; kdyby někam ŝel, tak by přece zhasl lampu, že jo. To on musí být někde v bytě. – Tak vám prohledali celý byt, ale nikde nic. Paní Hirschová začala na tom svém fotelu usedavě plakat; ono to vypadalo, říkal potom ten Hugo, jako by se tam třásla taková hromada sulcu. Paní Hirschová, ŝekl ten Hugo – to máte zvláštní, jak takový mladý žid rázem přijde k rozumu, když to musí být –, paní Hirschová, neplačte; on pan Hirsch nikam neutek, vždyť kůže teď jdou a krom toho neinkasoval žádné pohledávky, že jo; on pan šéf někde musí být.

Se oni ne trovas lin ĝis la vespero, ni diros do tion al la polico, sed ne pli frue; sciu, sinjorino Hirš, tia frapanta afero ne utilas por la butikoj. Ĝis la vespero ili atendis kaj serĉis, sed post sinjoro Hirš eĉ ne spuro. Kiam sinjoro Hugo je la kutima horo fermis la butikon, li iris anonci al la polica direkcio, ke sinjoro Hirš perdiĝis. El la polico oni sendis tien detektivojn; memkomprene, tie ili ĉion funde traserĉis, sed trovis eĉ ne etan spuron; ankaŭ la sangon ili serĉis sur la planko, sed nenio; dume ili sigelfermis la kontoron. Poste ili enketis sinjorinon Hirš kaj la ceteran personaron pri tio, kio okazis tiumatene. Sed neniu sciis ion ekstran; nur sinjoro Hugo rememoris, ke post la deka venis al sinjoro Hirš sinjoro Lebeda, agento, kiu parolis kun sinjoro Hirš proksimume dek minutojn. Ili serĉis do tiun sinjoron Lebeda, kaj memkomprene, ili trovis lin en kafejo Bristol, ludanta hazardludon. Tiu Lebeda rapide estis kaŝanta la ludbankon, sed la detektivo diras al li: Sinjoro Lebeda, hodiaŭ ĝi ne estas pro la hazardludo, hodiaŭ ĝi okazas pro sinjoro Hirš, nome sinjoro Hirš perdiĝis al ni, kaj eble vi estis la lasta, kiu lin vidis. Nu jes, sed tiu Lebeda ankaŭ sciis nenion; li estis ĉe sinjoro Hirš nur pro iaj rimenoj kaj rimarkis nenion neordinaran; nur sinjoro Hirš ŝajnis al li ankoraŭ pli kaduka ol alifoje. Sed iel vi kadukiĝas, sinjoro Hirš, li diris al li. Sed, sinjoro, diris al li tiu komisaro, eĉ se sinjoro Hirš malgrasiĝus ankoraŭ pli multe, li ne povis perdiĝi aeren; almenaŭ ia osto aŭ dentaro devus postresti, ĉu. Kaj en la teko ankaŭ vi ne povis lin forporti. Sed atendu, nun la kazo havas alian finon. Vi scias ke en la stacidomoj estas vestejoj, kie pasaĝeroj deponas al si diversajn aĵojn kaj kofrojn. Pasis proksimume du tagoj post la malapero de sinjoro Hirš, kiam ia vestgardistino diris al iu portoservisto, ke ŝi havas tie ian kofron kaj ĝi ne volas plaĉi al ŝi. Mi eĉ ne scias, kial, ŝi diris, sed tiun kofron mi eĉ timas. - Do la portoservisto iris priflari la kofron kaj diras:

Kdyby se nenašel do večera, tak o tom řekneme na policii, ale dřív ne; to víte, paní Hirschová, taková nápadná věc nedělá závodu dobře.

Teda do večera čekali a hledali, ale po panu Hirschovi ani památky. Když teda pan Hugo v patřičnou hodinu zavřel krám, šel na policejní direkci ohlásit, že se pan Hirsch ztratil. Tak tam z policie poslali detektivy; to víte, ti tam všechno prošťárali, ale nenašli ani tu nejmenší stopu; i krev hledali na podlaze, ale nikde nic; tak zatím zapečetili ten kontor. Potom vyslychali paní Hirschovou a ostatní personál, co se toho rána jako dalo. Ale nikdo nevěděl nic zvláštního; jenom pan Hugo si vzpomněl, že po desáté hodině přišel k panu Hirschovi pan Lebeda, obchodní cestující, a mluvil s panem Hirschem asi deset minut. Tak hledali toho pana Lebedu, a to se rozumí, našli ho v kavárně Bristol, jak hraje ramšla. Tak ten Lebeda honem schovával bank, ale ten detektiv mu povídá: Pane Lebeda, dnes to není skrz ramšla, dnes je to skrz pana Hirsche; on se nám pan Hirsch ztratil, a vy jste byl poslední, kdo ho viděl. No jo, ale on ten Lebeda nevěděl taky nic; byl u pana Hirsche kvůli nějakým řemenům a nic zvláštního nepozoroval; jen se mu pan Hirsch zdál ještě chatrnější než jindy. Vy ale nějak scházíte, pane Hirsch, řekl mu. – Ale pane, řekl mu ten komisař, i kdyby pan Hirsch zhubl ještě víc, tak se nám nemohl ztratit ve vzduchu; aspoň nějaká kost nebo chrup by po něm musely zůstat, že jo. A v aktovce jste ho taky odnést nemohl.

Ale počkejte, teď má ten případ druhý konec. To víte, jak jsou na nádraží ty šatny, co si tam cestující nechávají všelijaké věci a kufry. Tak to bylo asi dva dny po zmizení pana Hirsche, a ta šatnářka řekla jednomu posluhovi, že tam má takový kufr a ten že se jí nechce líbit. Já ani nevím proč, řekla, ale já se toho kufru zrovna bojím. Teda ten posluha šel k tomu kufru čuchnout a povídá:

Patrino, sciu, diru tion prefere al la stacidoma polico. - Ili alkondukis polican hundon kaj tiu, ekflarinte la kofron, komencis hurli kaj hirtigi tegumenton. Tio estis jam suspektiga kaj tial oni elrompis la kofron: kaj en ĝi estis enŝtopita la kadavro de sinjoro Hirš en negliĝa surtuto kaj pantofloj. Ĉar li havis hepatmalsanon, oni povis lin ankaŭ, la povrulon, senti. Kaj en la kolon li havis entranĉitan fortan ŝnuron: li estis strangolita. Sed plej strange estis, kiel li povis veni en la negliĝa surtuto kaj pantofloj el sia kontoro en la kofron en la stacidomo.

Ĉi tiun kazon ricevis komisaro Mejzlík. Li ekrigardis la kadavron kaj tuj li vidas, ke ĝi havas sur la vizaĝo kaj sur la manoj iajn verdajn, bluajn kaj ruĝajn makulojn; tio estis des pli frapanta, ke tiu sinjoro Hirš estis bruna. Tio estas stranga simptomo de malkomponiĝo, diris al si sinjoro Mejzlík, kaj provis froti per poŝtuko unu tian makulon; kaj jen, la makulo defrotiĝis.

Aŭskultu, li diris al la aliaj, ĝi aspektas kvazaŭ de anilino. Mi devas ankoraŭ foje rigardi en la kontoron. En la kontoro unue li okulserĉis iajn kolorojn, sed nenio tie estis; sed subite li ekokulis la rolitajn persajn tapiŝojn. Li disrolis unu kaj frotis tie ian bluan desegnaĵon per salivita poŝtuko; kaj sur la poŝtuko fariĝis blua makulo.

Tio estas fia varaĉo, ĉi-tapiŝoj, diris sinjoro komisaro kaj serĉis plu; sur la tablo de sinjoro Hirš li trovis sur inkuja pladeto du aŭ tri stumpojn de turkaj cigaredoj. Tion memoru, homo, li diris al iu detektivo, ke dum la negocado kun persaj tapiŝoj oni ĉiam fumis cigaredon post cigaredo; tio jam apartenas al la orientaj kutimoj. Kaj poste li venigis sinjoron Hugo.

Sinjoro Hugo, li diris al li, post sinjoro Lebeda estis ĉi tie ankoraŭ iu, ĉu jes? Estis, diris sinjoro Hugo, sed sinjoro Hirš neniam volis, ke ni parolu pri tio. Vi zorgu pri la ledoj, li diradis al ni, sed la tapiŝoj ne rilatas vin; tio estas mia afero. Memkomprene, diras sinjoro Mejzlík, ĉar ili estas kontrabandaj tapiŝoj; vidu, eĉ ne unu el ili havas doganplombon.

Matko, vité co, řekněte o tom raději nádražní policii. – Tak oni vám přivedli policejního psa, a ten, když k tomu kufru čuchnul, začal vrčet a ježít chlupy. To teda už bylo jaksi nápadné, a proto ten kufr vypáčili: a v něm vám byla vtlačena mrtvola pana Hirsche v županu a trepkách. Protože měl jaterní nemoc, tak ho už taky bylo, chudáka, cítit. A v krku vám měl zaříznutý takový silný špagát; byl uškrcen. Ale nejdivnější bylo, jak se mohl v županu a v trepkách dostat ze svého kontoru do kufru na nádraží.

Tak tenhle případ dostal komisař Mejzlík. On se vám podívá na tu mrtvolu a hned vidí, že má na tváři a na ruce takové zelené, modré a červené fleky; ono to bylo tím nápadnější, že byl ten pan Hirsch takový hnědý. To je divný úkaz rozkladu, řekl si ten pan Mejzlík, a zkusil třít kapesníkem jeden takový flek; a on ten flek pouštěl.

Poslouchejte, řekl teda těm druhým, ono to vypadá jako od nějakého anilínu. Já se musím ještě podívat do toho kontoru. Nejdřív tedy v tom kontoru koukal po nějakých barvách, ale nebylo tam nic; a najednou mu padly do očí ty sbalené perské koberce. Tak jeden z nich rozbalil a třel tam takový modrý mustr nasliněným kapesníkem; a na tom šátku se mu udělal modrý flek.

To je zatracený šmejd, tyhle koberce, řekl pan komisař, a hledá dál; na stole pana Hirsche našel na misce kalamáře asi dva nebo tři špačky od tureckých cigaret. To si pamatujte, člověče, řekl jednomu detektivovi, že se při tomhle kšeftu s perskými koberci vždycky kouří jedna cigareta za druhou; to už patří k těm orientálním zvykům. A pak si zavolal pana Huga.

Pane Hugo, řekl mu, on tu po tom panu Lebedovi byl ještě někdo, že jo? Byl, řekl pan Hugo, ale on pan Hirsch nikdy nechtěl, abychom o tom mluvili. Vy si hledte kůží, říkal nám, ale po kobercích vám nic není; to je má věc. To se rozumí, povídá pan Mejzlík, protože to jsou pašované koberce; koukejte se, ani jeden z nich nemá celní plombu.

Se sinjoro Hirš ne estus mortinto, li havus pro tio ege aĉajn malagrablojn en la doganejo kaj punpagus, ĝis li bluiĝus. Rapide do, kiu estis ĉi tie!

Nu, diris sinjoro Hugo, proksimume je la deka kaj duono alveturis per kabrioletoj ia armena aŭ kiu scias kia judo, gradiketa kaj flaveta, kaj demandis turke aŭ iel simile pri sinjoro Hirš. Mi montris do al li la vojon supren al la kontoro. Kaj post li iris ia longegulo, servisto, malgrasa kiel ŝindo kaj nigra kiel nigra kato, kaj portis surŝultre kvin grandajn rolitajn tapiŝojn; mi eĉ miris kun Venceslao, kiel li kapblas tion porti. Tiuj du iris en la kontoron kaj estis tie proksimume dek kvin minutojn; mi ne zorgis pri tio, sed konstante oni povis aŭdi, kiel tiu ulo parolas kun sinjoro Hirš.

Poste tiu servisto descendis kaj surŝultre li portis nur kvar rolitajn tapiŝojn; ha, mi diris al mi, sinjoro Hirš denove aĉetis unu tapiŝon. Jes, kaj tiu armeno turniĝis en pordo de la kontoro kaj ankoraŭ diris ion al sinjoro Hirš en la kontoron, sed kion, tion mi ne komprenis. Nu, kaj poste la longegulo ĵetis la tapiŝojn en la aŭton kaj ili forveturis. Mi ne diris tion nur tial, ĉar ĝi estis nenio neordinara, jes, diris sinjoro Hugo. Tiaj tapiŝistoj estis oftaj ĉe ni kaj ĉiuj estas la samaj ŝtelistoj.

Nu, sinjoro Hugo, diris poste sinjoro Mejzlík, sciu, io neordinara tamen estis ĉe tio: li, tiu longegulo en iu rolita tapiŝo forportis la kadavron de sinjoro Hirš, ĉu vi komprenas? Pro Jesuokristo, homo, vi povis ja rimarki, ke tiu ulo iris malsupren pli peze ol supren!

Tio estas vero, diris Hugo kaj paliĝis, li iris ja tute kurbiĝinta! Sed sinjoro komisaro, tio ne estas ebla: li, tiu dika armeno, postiris lin kaj ankoraŭ parolis kun sinjoro Hirš en pordo de la kontoro! Nu jes, diris doktoro Mejzlík, li parolis al la malplena kontoro. Kaj kiam antaŭe tiu longegulo strangolis sinjoron Hirš, tiu sinjoro dume senĉese vortŝutis, jes. Sinjoro Hugo, tia armena judo estas pli ruza ol vi.

Kdyby pan Hirsch nebyl v pánu, tak by s tím měl zatracené opletačky v Hybernské ulici a platil by pokutu, až by byl modrý. Tak honem, kdo tu byl!

No, řekl pan Hugo, asi o půl jedenácté přijel otevřeným autem nějaký arménský nebo jaký žid, takový obtloustlý a nažloutlý, a ptá se turecky nebo jak po panu Hirschovi. Tak jsem mu ukázal cestu nahoru do kontoru. A za ním šel takový čahoun, sluha, hubený jako šindel a černý jako černá kočka, a nesl na rameni pět velkých srolovaných koberců; ještě jsem se s Václavem divil, jak to unese. Tak ti dva šli do kontoru a byli tam asi patnáct minut; my jsme se o to nestarali, ale ono bylo pořád slyšet, jak ten někdo hovoří s panem Hirschem.

Pak teda zas slízal ten sluha dolů a nesl na rameni jenom čtyři srolované koberce; aha, řekl jsem si, to pan Hirsch zas jeden kus koupil. Jo, a ten Armén se ve dveřích kontoru obrátil a ještě něco panu Hirschovi do kontoru povídal, ale co, tomu jsem nerozuměl. No, a pak ten čahoun hodil ty koberce do auta a odjeli. Já jsem to neřikal jen proto, že na tom nebylo nic zvláštního, že jo, řekl pan Hugo. Takových tepichářů u nás bývalo, a všichni jsou stejní zloději. Víte, pane Hugo, řekl na to ten pan Mejzlík, abyste věděl, něco zvláštního na tom přece jen bylo: on ten čahoun totiž v tom jednom srolovaném koberci odnášel mrtvolu pana Hirsche, rozumíte? Kristapána, člověče, vždyť jste si mohl všimnout, že ten chlap šel dolů tíž než nahoru!

To je pravda, řekl ten Hugo a zbledl, vždyť on šel celý sehnutý! Ale pane komisari, to není možné; on ten tlustý Armén šel za ním a ještě s panem Hirschem ve dveřích kontoru hovořil! No jo, povídá doktor Mejzlík, hovořil do prázdného kontoru. A když předtím ten čahoun pana Hirsche škrtil, tak ten pán taky přitom pořád mlel hubou, že jo. Pane Hugo, takový arménský žid je chytřejší než vy.

Kaj poste en la rolita tapiŝo ili fortransportis la kadavron de sinjoro Hirŝ en sian hotelon; sed ĉar pluvis, tiu aĉa, per anilino kolorita tapiŝo igis kolora sinjoron Hirŝ. Tio estas klara kiel saldokonto, ĉu. Kaj en la hotelo ili metis la animujon de sinjoro Hirŝ en la kofron kaj la kofron ili sendis al stacidomo; tiel estas, sinjoro Hugo!

Dum sinjoro Mejzlík ĉi tion faris, detektivoj jam trovis spuron de tiu armeno. Nome sur la kofro estis glumarko de iu berlina hotelo - el tio videblis, ke la armeno orde pagis sian trinkmonon; sciu, la hotelpordistoj donas al si per glumarkoj signojn tra la tuta mondo, kiel esperigas tiu kliento finance. Kaj ĉar la armeno bone pagis, tial la berlina pordisto ankaŭ bone memoris lin: li nomiĝis Mazanian kaj veturis probable tra Prago al Vieno; sed ili kaptis lin nur en Bukaresto; tie en aresto li pendumis sin.

Kial li murdis sinjoron Hirŝ, tion neniuj scias; plej versimile ili havis inter si komercan konflikton el tempo, kiam sinjoro Hirŝ estis en Istanbulo. Sed el la historieto videblas," finis sinjoro Tausig enpense, „ke la ĉefa afero en la negocado estas la solideco. Se la armeno havas kvalitatajn tapiŝojn ne koloritajn per malkara anilino, oni ne malkovrus tiel baldaŭ, kiel li forigis tiun sinjoron Hirŝ, jes. Sed vendadi varaĉon, tio venĝe trafos kiun ajn."

A pak v tom srolovaném koberci odvezli mrtvolu pana Hirsche do svého hotelu; ale protože pršelo, tak ten previtský, anilínem barvený koberec pustil barvu na pana Hirsche. To je jasné jako saldokonto, že jo. A v hotelu dali tělesnou schránku pana Hirsche do kufru a kufr poslali na nádraží; teda tak je to, pane Hugo!

Tak zatímco pan Mejzlík dělal tohle, našli už tajní stopu po tom Arménovi. Ona totiž na tom kufru byla nálepka jednoho berlínského hotelu – z toho bylo taky vidět, že ten Armén platil pořádně své diškerece; víte, tihle portýři z hotelů si těmi nálepkami dávají po celém světě znamení, co z toho kunčofta kouká na tuzérech. A protože ten Armén dobře platil, tak si ho ten berlínský portýr taky dobře pamatoval: jmenoval se Mazanian a jel nejspíš přes Prahu do Vídně; ale ĉapli ho až v Bukurešti; tam se taky ve vyšetřovací vazbě oběsil.

Proč toho pana Hirsche zavraždil, to žádný neví; nejspíš měli spolu nějaký obchodní spor z té doby, kdy pan Hirsch byl v Čařihradě. Ale z tohohle příběhu je vidět," končil pan Taussig zamyšleně, „že hlavní věc v obchodu je solidnost. Kdyby ten Armén vedl pořádné koberce, co nejsou barvené tím laciným anilínem, nebyli by na to tak hned přišli, jak toho pana Hirsche odklidil, že jo. Ale prodávat póvl, to se jednomu vymstí."